

Redakcia noto

100-jara datreveno de Ivo Lapenna

En tiu ĉi jaro ni havas rondan datrevenon eĉ de du elstaraj figuroj de la historio de Esperanto. Unu el ili estas la 150-jara jubileo de *Ludoviko Zamenhof*, la alia estas la 100-jara datreveno de la naskiĝo de *d-ro Ivo Lapenna*, konstruinto de la niaepoka Esperanto-movado, la "heroo de Montevideo". *Lapenna* estis longtempa gvidanto de Universala Esperanto-Asocio, kaj havas neforgeseblan meriton pro atingo de la internacia rekonado de Esperanto ĉe la asembleo de UNESKO en 1954, en Montevideo.

Ivo Lapenna naskiĝis en *Split* (Dalmatio, Jugoslavio) la 5-an de novembro 1909 en malnova dalmata, aristokrata familio. Lia vivo estis plene kunligita kun la Esperanto-ideo kaj Esperanto-movado. Li el-lernis Esperanton kiel memlernanto en 1928. Li estis kunfondinto de Studenta Esperanto-Klubo (poste Akademia Esperanto-Klubo) en la Universitato de *Zagreb* en 1929, kaj ĝia prezidanto ĝis aprilo 1941; fondinto de Studenta Tutmonda Esperanto-Ligo (STELO) dum la UK en Budapeŝto en 1929, kaj ĝia prezidanto ĝis la komenciĝo de la Dua Mondmilito; prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo de 1937-1950; komitatano kaj estrarano de IEL (ekde 1947 UEA) de 1938-1974; ĝenerala sekretario de UEA de 1955-1964; prezidanto de UEA de 1964-1974; fondinto de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) en 1957 kaj ekde tiam ĝia prezidanto, iniciatinto kaj dum pluraj jaroj redaktoro de ĝia organo "Internacia Jura Revuo", membro de la Akademio de Esperanto ekde 1952, kunfondinto de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM) en 1980, ekde tiam ĝia prezidanto, membro de la redakta komitato de "Horizonto" kaj ĝia ĉefa kunlaboranto.

Post lia forpaso la 15-an de decembro en 1987 en Kopenhago, honore al lia agado estis starigitaj du instancoj: "Internacia Scienca Instituto *Ivo Lapenna*" kaj "Fondaĵo *Ivo Lapenna*" – kiuj nun instigas ĉiujn Esperanto-organizaĵojn, klubojn kaj individuojn ĉie en la mondo celebri la du gigantojn per multaj ekspozicioj, prelegoj kaj artikoloj en la gazetaro pri ilia enorma, eminenta kaj elstara laboro por la Internacia Lingvo, Esperanto.

Ampleksa materialo pri lia agado, viv-prezento, verkoj, rezultoj, artikoloj, paroladoj ktp. estas kolektita en aparta retejo:

<http://www.ivolapenna.org>

Ekonomia Esperanto

Hans B. WELLING

Kiom facila estas Esperanto?

Esperanto estas tre facila lingvo, tion ni ĉiuj scias. Sed kiom facila? Rare oni aŭdas precizajn ciferojn. Kion vi persone opinias?

El "Esperanto" per *Google* rezultis:

serĉvortoj	respondoj anglalingvaj	respondoj germanlingvaj
Esperanto facila	1 840 000	123 000
Esperanto facila faktoro	212 000	9 500

Inter tiuj respondoj la kapvorto "faktoro" plej ofte, de pli ol 95%, ne temas pri la demando, kiom pli facila estas Esperanto ol naciaj lingvoj.

Kelkaj trovitaj respondoj pri la facileco:

tre facila
relative facila
kvar oble pli facila
 kvin oble pli facila
 ĝis dek oble pli facila
 "ĉielolarĝa diferenco".

Relative detala dokumento de *Corsetti*¹ rilatas al la facileco tiel:

1. "... question remaining today is how easy Esperanto is to learn" (... restas nuntempe la demando, kiom facile estas lerni Esperanton),
2. "... is, relatively, a very easy language" (estas relative tre facila lingvo).

Li ne donas ciferon, ne donas faktoron.

¹ http://springboard2languages.org/documents/springboard_rationale.pdf

Inter 17 titoloj de la literaturo aldonita al tiu ĉi dokumento estas neniu, kiuj traktas nian demandon de “faktoro de facileco”.

Senkonsidere ĉu la facileco de nia lingvo ofte estas akcentita, evidente ni evitas precizecon.

Ĉu ni malkaŝe traktu la aferon?

Sed unue mi volas provi klarigi iom pli tiun “faktoron”.

Tempo bezonata por lerni la anglan lingvon

Kalkulo por germana lernanto:

[1 lerneja jaro = po 4 horoj en semajno
x 40 instru-semajnoj = 160 horoj]

5 jaroj (mezlernejo) 800 horoj

8 jaroj (gimnazio) 1280 horoj

Kostoj por gimnazia lernanto: x 10 €/horo = 12800 €

Post tiuj 1280 gimnaziaj instru-horoj oni devus povi flue legi anglalingvajn librojn, kun rara uzo de vortaro. Kaj oni devus povi fari ĉiutagan konversacion kaj negocojn en la angla lingvo.

Rimarkoj

La facileco estas malsama inter diversaj lingvoj. Ĝi dependas de la “lingva distanco” (angle *linguistic distance*). La lingva distanco inter la germana kaj la angla lingvoj estas relative malgranda. La lingva distanco inter la ĉina lingvo kaj la angla estas multe pli granda. La “faktoro de facileco” estas alia por ĉiu paro da lingvoj.

Tempo bezonata por lerni Esperanton

Ĉirkaŭ 40 horoj²

Kostoj por lernanto: x 10 €/horo = 400 €

Ankaŭ en tiu ĉi okazo mi juĝas la konojn de lernanto bona, se li povas, post 40 instru-horoj, flue legi esperantlingvajn librojn, kun rara uzo de vortaro, kaj fari ĉiutagajn konversaciojn kaj negocojn en Esperanto.

La “faktoro de facileco”

Por komparo ni dividu 1280 per 40. Rezulto = 32.

La rilato inter la bezonataj tempoj estas **faktoro 32**. Tre alta faktoro, surprize alta. Esperanto laŭ tio estas 32-foje pli facila.

² laŭ la rezulto el enketo inter 15 esperantistoj.

Oni povas pridubi tiun faktoron, aŭ relativigi ĝin.

- a) La kutima klasika lerneja sistemo de la instruado de lingvoj ne estas tre efika. Relative multaj lernadohoroj estas spezataj por legi komplikajn literaturajn tekstojn. Tro malmulte da tempo estas uzata por gravaj lingveroj por la ĉiutaga lingvo kaj por negocoj. Eble oni povus lerni la anglan en 30% malpli da tempo.
- b) Relative multaj esperantistoj ne parolas aŭ skribas bonan Esperanton. Ekzistas relative multaj “eternaj komencantoj”. Tial kelkaj homoj opinias, ke Esperanto estas fakte malfacila. Ĉu tio veras?

Mi taksas tion tiel: Esperantistoj ne ĉiam ricevas bonan instruon. Parte ili studas nian lingvon per memstudado. Tio eblas nur en Esperanto, ne eblas en nacia lingvo. Parte iliaj instruistoj ne estas spertaj, sed nur bonvolaj amatoroj. Multaj lernantoj ne laboras intense por lerni nian lingvon – rekalkulante la kvanton da horoj, oni trovas, ke ili ĉesis vere lerni post la duono de la minimume bezonataj horoj.

Kalkuloj de bezonata tempo estu kompareblaj

En plejmulto de la retaj pridemandoj aperas respondoj neprecizaj laŭ la lernokvantoj, ekz. “... mi lernis Esperanton dum tri monatoj, mi lernis la francan dum 5 jaroj” aŭ “Iu instruis Esperanton dum tri monatoj...”. Nur rare tio estas precizigita per ekz. “...po du horojn en semajno”.

Kiel kalkuli?

Por fari ciferojn kompareblaj mi kalkulas la longecon de la lernado en horoj. Por esti **je la certa flanko**, mi dirus, ke **faktoro 20** estas laŭ mi realisma. Sed la kvanto de 40 horoj de lernado por atingi la kapablon legi kompletajn librojn (kun nur rara uzo de vortaro) ŝajnas tute kaj senriproĉe realisma.

Ekonomiaj argumentoj por Esperanto

La faktoro 20 estas forta ekonomia argumento. Nia interligita mondo produktas kreskantan konkurencon inter popoloj. Multaj kompanioj importas kaj eksportas kreskantan parton de siaj produktoj. Pro tio kreskanta nombro da homoj devas koni la lingvojn de siaj liverantoj kaj klientoj – almenaŭ bezonatas do 20% da “sciantoj”.

La plej ofte uzata lingvo en la internacia komerco estas nuntempe la angla. Ĉirkaŭ 10% de la homaro parolas la anglan kiel gepatran lingvon. Pliaj 10% lernas ĝin en lernejoj kaj kursoj kiel duan lingvon. Ĉirkaŭ 80% de la mondogpopolacio ne parolas la anglan.

Por la menciitaj 20% da “sciintoj” tamen ekzistas ankoraŭ problemoj interkompreniĝi, ĉar

- kiel antaŭe menciite, multaj lernis nur literaturan anglan, ne povas apliki ĝin en komerco sen problemoj;
- multaj forĝesis, post jaroj, siajn konojn;
- tre stranga, sed tamen grava problemo: diversaj angloj kaj usonanoj uzas strangan lingvon, dialektecan aŭ tro komplikitan³.

Politikistoj kaj pedagogoj ofte postulas, ke ĉiu lernu pli ol unu fremdan lingvon. Samtempe ni devas konstati en mia lando Germanio, ke nia lerneja sistemo havas kreskantajn problemojn doni bonan edukon al nia junularo. Eĉ la germana lingvo estas ne sufiĉe bone regata, ne nur de la infanoj de migrantoj, sed ankaŭ de la infanoj de germanaj gepatroj. Tiom pli granda estas la problemoj akiri bonajn konojn de fremdaj lingvoj.

En Japanio mi devis konstati, ke surprize malgranda parto de la japanoj efike regas la anglan – tio malgraŭ la fakto, ke ĉ. 90% de ili ricevis gimnazian edukon kun multjara instruado de la angla lingvo.

Tiom pli malbonaj estas la lingvaj konoj en malpli riĉaj landoj. Ilia junularo havas treege pli malbonajn ŝancojn, ekz. en Afriko, en la meza kaj la suda Ameriko, kaj en Azio⁴.

³ Tiu ĉi problemoj estis prezentita i.a. dum la Simpozio ĉe la Eŭropa Parlamento 2003 “*What language policies for a multilingual European Union?*” (Kiujn lingvopolitikojn por multlingva Eŭropa Unio?)

⁴ Citaĵo el *Japan Times* 2007-08-14 pri Filipinoj: “*English is widely considered an advantage in global competitiveness ... English is an official language here, along with the native Tagalog. Yet the US-State Department in its 2007 Investment Climate Statement concluded: “English-language proficiency, while still better than in other Southeast Asian nations, is declining in the Philippines.”* (La angla lingvo estas vaste rigardata avantaĝo en la tutmonda konkurado ... la angla estas ĉi tie oficiala lingvo, samrange

Do, laŭ ĝenerala agnosko, la kono de fremda lingvo estas tre grava por ekonomia sukceso, kaj kono de individuoj kaj kono de nacioj. Estas tamen fakto, ke multaj homoj tute ne kapablas lerni alian lingvon. La homoj kun la angla kiel gepatra lingvo havas nejustan avantaĝon.

Mi opinias, ke ni esperantistoj devus argumenti surbaze de niaj ekonomiaj avantaĝoj. Faktoro 20 valoras por la tempo bezonata. Ĝi same valoras por la kostoj.

La propedeŭtika efiko de Esperanto

Ankaŭ tio estas grava ekonomia argumento. Studoj⁵ montris, ke la lernado de Esperanto

- plifaciligas klare la postan lernadon de aliaj lingvoj,
- estas efike senkosta,
- plibonigas ankaŭ la konon de la gepatra lingvo.

Aŭtomata tradukado

Post elspezo de ĉ. 10 milionoj da nederlandaj guldenoj (!) la projekto DLT⁶ ĉesis. Kompanioj kaj ŝtatoj elspezis eble dekoblon de tio por solvi la problemon de tradukado. Sen bona rezulto, parte kun nur ridindaj rezultoj.

Antaŭnelonge Unuiĝintaj Nacioj (UN) lanĉis multlingvan projekton kun buĝeto de 100 milionoj da dolaroj. Rezultoj estas ankoraŭ nekonataj. La UN-projekto uzas kiel centran pontolingvon komplikitan konstruon el formuloj similaj al HTML⁶ (ekz. #2340kltempo), do ne kompreneblan al normalaj homoj.

(4) ... kun la indiĝena *Tagalog*. Sed la usona *State Department*, dum sia InvestKlimat-Deklaro de 2007 konkludis, ke “la anglalingva kapablo, kvankam ankoraŭ pli bona ol en aliaj sudorient-aziaj nacioj, malpliigas en Filipinoj”

⁵ vd. la piednoton en la unua paĝo: en tiu dokumento p. 3 “*17 Field studies*”. Certe valorus traduki tiujn studojn. Tre probable ili entenas multajn datumojn, kiuj povas subteni pluajn ekonomiajn argumentojn por Esperanto.

⁶ DLT = *Direct Language Translation*; HTML = *Hypertext Markup Language*.

Mi forte pensas, ke tiu DLT-projekto (*“Direct Language Translation”*) de UN estos

- multe pli kosta ol buĝetite,
- kaj ne produktos bonajn rezultojn.

Ni vidu!

Mi pensas, ke valorus investi 50 milionojn da dolaroj en renovigita DLT, nome projekton kun Esperanto kiel pontolingvo. Ni trovu personon aŭ grupon, kiu povas investi tian sumon. Sed por trovi iun kaj konvinki lin, ni devas pli efike organizi niajn argumentojn.

Pensludo “Esperanto-Projekto Eŭropa Unio”

1. Kiom da tempo estus bezonata por instrui Esperanton al ĉiuj parlamentanoj kaj dungitoj en Eŭropa Unio?
Rimarko: Ni supozu, ke tiuj estas ĉiuj inteligentaj kaj diligantaj.
Respondo: 40 horoj, do unu semajno. Pesimistoj pri tio povas kalkuli la duoblon. Post tiu(j) du semajno(j) oni povus peti, ke ĉiuj proponoj pri leĝoj kaj prelegoj estu en Esperanto. Tuj poste grandaj spezoj estos ŝparataj. Kelkaj supozeble ankoraŭ bezonos la kutiman tradukadon, sed speciale la “malgrandaj landoj” (kiuj ja ĉiukaze havas lingvajn problemojn kun la “grandaj” lingvoj) probable volonte akceptus la novan ŝancon.
2. Por asisti la diligentecon de la partoprenantoj, oni povus pagi po 100 € pli en monato al ĉiuj, kiuj sukcese pasis la ekzamenon ĉe la fino de la Esperanto-kurso.

Adreso de la aŭtoro

Hans B. WELLING

Zum Ortenbrink 42

DE – 49205 Hasbergen / GERMANIO

<dj4pg@t-online.de>

Priaŭtoro informo

La aŭtoro studis elektroteĥnikon kaj informadikon ĉe la Teĥnika Universitato Aachen / Germanio, kaj laboris kiel inĝeniero en Eŭropo kaj Azio.

Seksa konflikto ĉe lepidopteroj (*Lepidoptera*)

Wendel J. TELES PONTES

Enkonduko

La plej bonaj modeloj por studi kopulaci-sistemojn ĉe insektoj kaj testi hipotezojn, kiel natura selekto agas en la organismoj, estas la ordo *Lepidoptera*, al kiu apartenas papilioj kaj noktopapilioj. Ili bone taŭgas por studado de la kopulacia ofteco, ĉar la maskloj fekundigas la femalojn per transdono de ĥitina pakaĵo riĉa je spermo kaj nutraĵo, nomata **spermatoforo** (Bildo 1). Malgraŭ ke la spermatoforo en la femala reprodukt-organo malkonstruiĝas (pro foruzado de spermo kaj sorbado de nutraĵo), kelkaj ĥitinaj strukturoj restas en la femalaj organoj dum la tuta vivo.

Dum ĉiu kopulacio la maskloj transdonas nur unu spermatoforon. Tiel oni povas per dissekcado atesti, kiom da spermatofor-restaĵoj estas ene de la korpo kaj informiĝi, kiom da fojoj la femaloj estas kopulaciintaj (Burns, 1968; Wedell k.a., 2002b). Tiel eblas koni la kopulaci-oftecon de ĉiu specio de lepidopteroj en la naturo simple pere de la nombro da spermatoforrestaĵoj trovitaj en kaptitaj femaloj (Arnqvist & Nilsson, 2000) – ĉe insektoj, kiuj ne produktas spermatoforojn, malfacila afero.

La femaloj investas multe pli da energio kaj resursoj en la reproduktadon ol la maskloj. Dum femaloj portas limigitan nombron de ovoloj por fekundigo, la maskloj siavice portas miliardon da spermatozojoj por fekundigi femalajn ovolojn (Drummond, 1984). Dum la femaloj prizorge elektas inter la disponeblaj maskloj la plej bonan, la maskloj provas kopulacii multnombre por garantii la patrecon de kiel eble plej multaj ovoj (Thornhill & Alcock, 1983). Kiam femalo kopulacias kun malbonkvalita masklo kaj trovas alian pli bonan, ŝi certe rekopulacios kaj anstataŭigos la unuan malbonkvalitan masklan donacon per la nova bonkvalita. Tiel la unua masklo perdos la oportuon patumi la ovojn de tiu femalo, kaj tempo kaj klopodo kopulacii iĝos vanaj.